

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

December 1946

34 årg. Nr 12

ORGAN FOR SVENSKA ESPERANTO-FORBUNDET



## Kristnaskaj pripensetoj

La nokto estis malluma. Sur la tero ĉirkaŭ la flametanta fajro la malriĉaj paŝtistoj kuŝis. La stelaro brilis en la mallumo.

En la brustoj de la paŝtistoj la homa eterna sopiro al feliĉo ardis kiel fajrero. La vivo ne favoris ilin. Malriĉeco kaj malsufiĉeco estis iliaj ĉiutagaj akompanantoj. La volo de la ŝafposedanto estis por ili leĝo, kiun ili devas obei, se ili deziras manĝi kaj — vivi.

Sed pano ne sufiĉas. Al la briletanta stelaro iliaj okuloj rigardas, kiam ili estas solaj kun si mem en la silenta nokto. La leĝo ne kapablas bari la vojon de la pensoj aŭ malhelpi la flugon de la deziroj aŭ haltigi la sopiron al feliĉo kaj paco.

Ilia forta sopiro naskigas novan klare briletantan stelon. Sur la firmamento ekflamas la stelo de la deziroj. Ĝi estas la simbolo de la homa deziro forigi la malbonaĵojn kaj krei ion belan, veran, sanan, bonan kaj inspiran...

Ne nur la malriĉuloj de la tero ekvidis la stelon de la revoj. Ankaŭ la saĝuloj de la Oriento, kies saĝeco ne kontentigis ilin, ekvidis la stelon. Ĝi pen-

dis kiel ora frukto sur la maldiketaj branĉetoj de la arbo de la sopiro.

La paŝtistoj aŭdis la kanton de la anĝeloj: *Bona volo — paco.*

La tri saĝuloj decidis trovi la homon, kiu kapablos krei la regnon de la feliĉo.

Vane la saĝuloj demandis en la palaco de la reĝo. La pacreĝo ne estis naskita inter muroj el marmoro.

En kaduka kabano, en ĉevala aŭ azena fojnujo Mario metis sian filon.

La legendo havas instruon al ni:

La bona volo de la potenculo kaj gvidanto ne sufiĉas. Plej ofte estas tiel, ke li estas sklavo de la tradicio. Li ne kapablas levi la okulon al io supertera. Li kalkulas la faktojn kaj eblecojn. Por li la realaĵoj sufiĉas.

La paco neniam estos la verko de iu ordonanto, kiu sidas sur la pinto de ŝtato, organizaĵo, partio k. t. p.

La bona volo kaj la paco devas havi lokon en la koroj de la individuoj. La bazo devas esti larĝa.

Tial niaj klopodoj — se ni serioze celas al realigo de la pacevangelio — devas kuniĝi en komuna, praktika laboro, aktualigi la evangelion inter la simpluloj de la nacioj, ŝtatoj kaj popoloj.

Oficiale la ŝtatestroj gvidas kaj decidas en la konferencoj. Sed la rezultato de iliaj decidoj estos vortoj sur la neĝo, se ne la amasoj komprenas sian rolon kaj provas efektiviĝi la idealon en la ĉiutago.

La klare brilanta stelo en la nuna mallumo estas la bona volo de la idealistoj diversspecaj, kiuj laboras por krei komprenon por la idealoj ĉe la ordinaraj, simplaj homoj.

Esperanto estas ilo. Ĝi povas esti praktike uzata kaj servos al komerco, turismo, filatelio ktp. Sed ni scias, ke la absolute ĉefa rolo de la lingvo de Zamenhof estas, ke ĝi malfermos la pordojn de la koroj, por ke *la homoj* — mi ne parolas pri diplomatoj kaj oficialuloj — komprenu, ke ni ĉiuj estas fratoj.

Same kiel la Betlehema stelo estas la simbolo de la eterna homa sopiro al feliĉo, same la esperanta stelo hodiaŭ radias kiel simbolo de la neceseco de komuna lingvo.

*Ede.*

## ZAMENHOF-DAGEN — BOKENS DAG

I december fira alla esperantister Dr Zamenhofs födelsedag, och det har blivit tradition, att i detta firande låta ingå en hyllning till den litteratur, som hans skapelse möjliggjort, till den litteratur, som nu bär hans verk vidare.

Esperantoklubbarna pläga anordna bokutställningar på sina Zamenhof-fester, och för den enskilde esperantisten är det en oskriven lag, att man på dessa fester, eller i varje fall i december, skall öka sin boksamling med minst en ny esperantobok.

Det är en vacker tradition, och esperantoförlagen göra allt för att tillfredsställa bökköparna. Under krigsåren var sådant ingen lätt sak, och ännu återstå många ekonomiska och tekniska svårigheter, som hindra vår esperantolitteratur att skjuta fart. Pappersbristen är ett hinder, men det största är dock den stränga valutaspärren mellan länderna, som har splittrat esperantovärlden i många små öar, där man förut hade en hel kontinent att kalkylera med, då man sökte avsättning för ett tryckalster. Det skulle ju vara esperantolitteraturens stora tillgång, att ha läsare över hela världen. Denna tillgång har nu en följd av år varit en illusion. Väl finns alltjämt läslystna esperantister över hela

världen, och deras antal stiger med varje dag, men de få svårare och svårare att tillfredsställa sin läshunger. Det egna landets resurser ge inte tillräcklig ekonomisk bas för en rik bokmarknad, och vägen från andra länder är stängd. I regel finns nog öppen väg för boken själv, men vägen för pengar i gengäld är stängd.

Det har därför blivit sed bland esperantister att byta bok mot bok med vänner i främmande land, och hur otillfredsställande denna utväg än är, visar den i alla fall den energi och det okuvliga intresse för saken, som dess bättre är esperantistens adelsmärke.

Med denna individernas självhjälp få vi emellertid inte slå oss till ro, och vår organiserade esperantorörelse gör det inte heller. På det fält vi idag betrakta, nämligen vår bokmarknad, arbeta våra förlag oförtrutet, och vårt svenska förlag, "Förlagsföreningen Esperanto", kan i dagens nummer bjuda ut en så stor och mångsidig kollektion av böcker, att de svenska esperantisterna inte heller i år behöva gå tomhänta från dess disk, då de på övligt sätt gå att bringa dr Zamenhofs minne sin hyllning på bokens dag. T. J.

**Mi estis en la Edeno**

Tibor Sekelj, argentina esploristo kaj esperantisto, rakontas en "Argentina Esperantisto", ke li "vizitis la Edenon". Li venis de Mato Grosso, Brazilo, kaj atingis Aragvajo (Araguaya), la plej grandan de la alfluviveroj de Tokantino, la riverego, kiu enfluas en la maron "tuj apud" la Amazon-rivero. Jen li mem parolu:

Dum dudekkvin tagoj ni remis tra la rivero Aragvajo, por alveni al la Bananinsulo, 1200 kilometrojn pli norden; poste ni ekmarŝis tra la insulego mem. serĉante la indianojn nomitajn javae', pri kiuj ni sciis nur ke malmultaj blankuloj ĝis nun vizitis ilin. Dekkvar tagojn ni rompis vojon tra la praarbaroj en senesperiga fortostreĉa marŝado. Ni jam estis elspezintaj ĉiujn rezervojn de manĝaĵoj, vivante nur de ĉaso kaj fiŝkaptado. Ankaŭ la esperoj estis elĉerpiĝintaj, kiam...

Iun posttagmezon, tute neatendite, ni ekvidis aron da bronzkoloraj homoj moviĝantaj maltrankvile sur la plaĝo de la rivero, en la distanco de ducent metroj de ni. Ili nin estis rimarkintaj antaŭ momento, kaj alarmitaj, nun la viroj estis kunigintaj siajn armilojn —arkojn kaj sagojn— dum la virinoj kuradis por kunigi siajn infanojn kaj kaŝi ilin en la proksima arbaro. Evidente, ilia unua penso estis: milito.

**Kiel transformiĝas malamikeco en amikecon.**

Por konfesi la veron, mi diros ke nia situacio ne estis la plej agrabla. Neniu el ni kvar iris tien ĝuste por perdi sian vivon de stulta indiana sago. Alvenis al mi tiam brila ideo. Mi ekkris laŭtege:

—Tori au-beaoa!— kio en lingvo ilia kaj de najbaraj indianoj signifas "Ni estas viaj amikoj!"

La vortoj havis neatenditan efikon. Ĉiuj tribanoj restis senmovaj sur sia loko. Kaj kiam mi ripetis la krion, la viroj kuniĝis por kelkminuta interparolado. Fine ĉiuj jetis siajn armilojn sur la sablon, per elmontra gesto, kaj unu el ili ekmarŝis renkonte al ni,

tiel nuda kia li naskiĝis, kaj marŝante tiel libere kvazaŭ li estus vestita per frako kaj promenus tra luksa salonego.

Post momentoj ni sigelis la pacon per ĉirkaŭbrako kaj li —Utaria estis lia nomo— alkondukis nin al sia vilaĝo. Post la elmontrado de nia amikeco pere de donacetoj, viroj, virinoj kaj infanoj ariĝis ĉirkaŭ ni, kvazaŭ ni estus muzeaj aĵoj kaj regalis nin per viando de testudo kaj lacertoj, ovoĵoj de testudo kaj arbara mielo.

**Matematika problemo**

Ni regalis ilin per viando de tapiro kiun ni estis ĉasintaj la antaŭan tagon kaj kiun ili avida formangiĝis pro la salo per kiu ni spicis ĝin. La medio fariĝis tre amika, malgraŭ la fakto ke tiuj primitivuloj estis vizititaj de blankuloj nur unufoje antaŭ ni, kaj ni devis por ili aspekti sufiĉe strangaj.


Nun ni povis plene uzi la lingvon kiun ni estis lernintaj kun la indianoj karaĵa, kiujn ni estis vizitintaj antaŭe. La konversacio estis senĝena. Ili demandis pri niaj nomoj, kaj ni pri la iliaj. Tiel mi malkovris ke mi havis tie preskaŭ samnomulon: Tibo' estis la nomo de unu el la plej simpatiaj junuloj de la tribo.

Li demandis min, kiel nomiĝas mia vilaĝo. Malfacila demando. La urbon en kiu mi naskiĝis, preskaŭ mi ne konis. En alia mi pasigis la infanaĝon; en tria mi finis miajn studojn; kvara fariĝis tre kara al mi. Fine mi decidiĝis:

**ESPERANTISTER**

Nu har den trevliga och bekväma samlingspärmen "Hiva-mappen" i Esperantos färger kommit till Sverige. För Eder korrespondens är den utomordentlig. Obs! Ingen hälslagning nödvändig. Format: 32×24 cm. Utom gröna och vita finnas även röda, gula och grå pärmar. Pris kr. 1:— pr styck; 1 duss. fraktfritt.

AB HIVA, Storskogsvägen 12, Alsten



**Prenumerera på utländska tidningar 1947.**

The British Esperantist	Kr. .... 2.50
Argentina Esperantisto	... 2.50
American Esperantist	.... 6.—
Dansk Esperantoblad	..... 3.—
Esperantobladet (Norge)	... 3.—
Franca Esperantisto	..... 3.—
HEROLDO	.... 9.—
Internacia Kulturo	..... 11.—
LA PRAKTIKO	8.25
Svisa Espero	.. 3.—
La Verda Flamo	4.50

**Förlagsföreningen  
E S P E R A N T O**  
Postgiro 578  
Stockholm 19

—Buenos Aires— mi diris, kaj la vorto flugis de buŝo al buŝo aliformita en diversaj sencoj.

—Kiom da kabanĝoj ĝi havas?— estis la sekvinta demando.

Denove mi troviĝis en embarasa situacio. Kiel mi klarigu al mia nova amiko, ke en "mia vilaĝo" ne ekzistas kabanĝoj, sed domegoj dek— kaj dudeketaĝaj? Kiel mi klarigu al li la kvanton? Bone mi sciis ke en ilia lingvo la plej alta nombro estas "dudek", nombro al kiu ili alvenas montrante la fingrojn de la manoj kaj poste de la piedoj, disigante ilin kun egala facileco. Fine alvenis al mi sav-ideo. Mi montris la fingrojn de miaj manoj kaj de miaj piedoj, kaj tuj poste tiujn de la manoj kaj de la piedoj de la indigeno.

—Tiom da kabanĝoj ĝi havas— mi diris.

—Aaahhh!— audiĝis ĉiuflanke. La ekkrio signifis miregon. Ili ne povis al mi kredi ke ekzistas tiel grandegaj vilaĝoj. Vere mi montris nur kvardekon, sed ĉio kio superas dudekon, estas por ili tiom multe, ke superas ilian imagkapablon, kaj certe ili konsideras min granda mensogulo.

#### **Praarbara Diogeno**

Iun vesperon mi rimarkis ke unu el la indianoj estis malkonstruanta sian kabanon faritan el palmfolioj. Mirigita pri la afero, mi demandis la homon, kial li estis faranta tion. Li respondis tute trankvile:

—Mi rekonstruos la kabanon en alian direkton ĉar matene la suno levigas de tiu ĉi flanko, kaj mi deziras ke la unuaj sunradioj veku min morgaŭ enirante en mian kabanon.

Tiu ĉi respondo montris la feliĉan senzorgecon de tiuj primitivuloj.

#### **La Edeno**

La materialon por konstrui la kabanĝojn, donas al ili la multnombraj palmoj je kiuj estas plenaj la arbaroj;

pri vestaĵo ili tute ne devas zorgi, ĉar la naturo vestis ilin per ilia edena nudeco, kiun ili lernis porti kun vera praarbara eleganteco. Ilia sola zorgo estas la manĝaĵo, sed ankaŭ tiun ili atingas ludante, ĉar la riveroj svarmas je bongustaj fiŝoj kaj testudoj, kaj la arbaro preparas por ili multspecajn fruktojn.

Kiam la sunsubiro pentras la ĉielon je purpuro, per longaj ombroj kovras la arbaro la vilaĝon. Kvieto regas la medion. Nur dum la plendlunaj noktoj eĥas kanto tra la aero memorante antikvajn kredojn de malproksimaj avoj, kies vivo en nenio diferencis de tiu de la nunaj javaeoj.

Je fajrolumo mi observas la reflektajn sur la glata kaj longa hararo de la arbarloĝantoj, nun miaj fratoj, kaj melankolio ekpremas mian koron. Mi pensas pri la proksima epoko kiam la civilizo atingos tiun ĉi trankvilan, forgesitan lokon, por doni al tiuj simpluloj kelkajn ĉifonojn kaj kelkajn manĝaĵojn, kies devenon ili ne komprenos, kaj por forpreni de ili la plej grandan trezoron kiun ili havas: ilian feliĉon.

Ĉar finfine, la feliĉo estas nenio alia ol la rilato inter la deziroj, kaj ilia realigo. Kaj ili deziras tiom malmulte!

#### **Alvoko al fervojistoj!**

La Hungara Fervojista Sindikato petas la eksterlandajn fervojistajn organizaĵojn, bonvolu kontaktiĝi kun ĝi kaj sciigi pri dato, kiam ili povos sendi siajn reprezentantojn (kiuj parolas esperanton) al Hungarujo, por ĉ. du semajnoj, kiel gastojn de la hungara fervojista sindikato. Respondon oni petas por Fervojista Sindikato, Budapeŝt, VIII., Kenyérmező-u. 6.

**LERNEJKAMARADOJ**

(daŭrigo)

Li amasigis la desegnaĵojn kaj metis ilin en la paperujon. Wern estis malfeliĉa. Li abomenis ofendi homojn — kaj precipe li ne volis ofendi Georg Bent. Li subite memoris tagon kiam li estis en la malfortaj klasoj kaj la kamaradoj konspiris kontraŭ li. Wern ja estis tiel malgranda kaj malforta, kaj tio sufiĉis por ke oni turmentu lin. Wern memoris ke oni trenis lin al lageto kaj premis lian kapon sub la akvon tiel longe ke li komencis aspekti nigra. Sed tiam Bent venis kaj liberigis lin, kelkfoje li dorsbatis liajn turmentulojn kaj trenis la plej danĝeran el ili al la rektoro por esti punita...

Ĉu li nun forlasus Bent? Estas ankaŭ malbonŝanco ke li ĉiam bezonas tiom da tempo por decidiĝi. Li devas gajni tempon.

Subite li ricevis ideon.

— Ne foriru, Bent! li diris. Mi malfacile povas havigi la sumon, sed Dahl facile povus prunti la sumon. Parolu kun li. Li nun estas en sia ĉambro. Bent pripensis momenton.

— Bone, li fine diris. Mi certe faros tion, tamen mi vere ne volas favori lin per ia profito... Kvin minutojn poste la pordo de la privatoficejo de Dahl estis malfermita, kaj Georg Bent elkuregis. Liaj vangoj estis ruĝaj kaj liaj okuloj fulmis. Malantaŭ li venis Dahl.

— Ĉu vi ne povas lasi min en trankvilo? li kriegis furioze Ĉu vi vere ne havas ion alian por fari ol sendi almozetantojn al mi? Vi estas stultega kompaniano.

— Ja estas Georg Bent, diris Wern.

— Tio ne faras la aferon pli bona. Ne gravas ĉu estas Bent aŭ iu alia — sed li estas ĉiuokaze senhonta almozetanto. Mi volas havi trankvilon dum mia laborado.

La pordo fermiĝis klake. Sen diri ion turnis sin Bent kaj foriris. Sed kiam li prenis la pordklinkon, li sentis la manon de Wern sur sia ŝultro.

— Mi havigos al vi la monon, li diris al Georg. Sed diru nenion pri tio al mia edzino. Ĉu vi ne volas akompani min hejmen kaj tagmanĝi kun mi?

Neniam Oscar Wern estis pli nervoza kaj senforta ol dum la jaro, kiu sekvis. Li suferis pro sendormo kaj kiam li fine matene ekdormis, li estis turmentita de la plej teruraj sonĝoj.

Sonĝe li ofte vidis grandan maŝinon, kiu laboris rapidege kvazaŭ tirante lin al si.

Subite komencis la maŝino moviĝi — antaŭen al lia hejmo kiun ĝi ruinigis kaj faligis. En la venonta sekundo Wern trovis sin en blanke kalkita ĉambro kun nur unu kradofenestro alte ĉe la plafono...

Kaj tiam li kutimis ekvekiĝi kun ĝemo.

Lia edzino konsilis al li viziti la doktoron, sed Wern kiu sciis, kio mankas al li, provis bagateligi la aferon. Sed li perdis la apetiton, paliĝis kaj maldikiĝis de tago al tago.

Georg Bent ricevis patenton je sia flugmaŝina motoro, kaj la gazetoj priskribis ĝin en longaj artikoloj. Certe same bonegaj kiel longaj raporto de Bent, kiu antaŭdiris rapidan sukceson.

Estiĝis firmo, kaj Wern ricevis amason da akcioj. Li sciis, ke se li vendus ilin nun, li ricevus siajn 10.000 kronojn kaj eĉ 100.000 ankoraŭ, sed Bent en ĉiu letero konsilis al li ne vendi ilin nun. Ili profitos multe pli, deklaris li, kiam la eksporto vere ekkomencos, la milionoj amasiĝos.

Tage Dahl planis provizore novan entreprenon, kiu donus centmilan profiton aŭ tirus ilin en konflikto kun la justeco. Wern komprenis tion, kaj li devis tuj forlasi la firmon.

Estus bone se li povus fidi je Bent, sed estis lia malfeliĉo, ke li ne povis fidi je iu, kaj ke li malfacile povis sin esprimi. Do li fine estis certa, ke li en volas kunlabori kun iu. Tiel okazis ankaŭ ĉi tiun fojon.

Estis griza dimanĉa frumateno en oktobro. Wern kaj lia edzino sidis apud la frumatenmanĝa tablo. La vento ludis per la lastaj folioj de la fruktarbaro en la ĝardeno, kaj ekkomencis pluveti.

— Nun baldaŭ estos fino, ĝemetis s-ino Wern kaj rigardis tra la fenestro, sed ŝi ne pensis je la arboj en la aŭtuna vento, sed je io tute alia.

— Fino?, kion vi diras?

— Kiam la folioj de la arbaro falas teren. Baldaŭ venos la vintro. Mia plej kara, kiel stranga vi estas. Kio okazis?

— Nenio, absolute nenio!

En la sama momento haltis granda aŭto antaŭ la barilpordo. Wern ekstaris tiel subite ke li renversis la kaftason. Estis la aŭto de Dahl. Nun li eliris la aŭton, kaj lia edzino venis malantaŭ li.

Wern elkuregis por akcepti ilin, kaj post kelkaj minutoj eniris ambaŭ kompanianoj en la ĉambron de Wern. Wern staris silente ĉe la pordo, kaj Dahl promenis senĉese tien kaj reen.

— Estas perditte, li diris fine.

— Wern glutis. La saman eldiron li jam aŭdis.

— Ni perdis ĉion, daŭrigis Dahl. Sed tio ne estas la plej terura.

— Ne la plej terura! Kion vi volas diri?

— Laambio kun la nomo de direktoro Hag.

— Kio okazis pri ĝi?

— Ne afektu nescion! Vi ja bone scias ke lia nomo estas falsigita.

— Fals... Tion... mi ne sciis!

— Ne, tiel facile vi ne forsavos vin, knabeto, diris Dahl kaj ridegis. Vi ne demandis, sed kompreneble vi komprenis dum la tuta tempo, ke direktoro Hag ne surskribis la kambion. Mi mem skribis lian nomon samtempe kiam mi skribis mian propran.

— Estas 25.000 kronoj.

**Ett Julpaket****för 2: — kronor**

Det innehåller:

**10 Esperanto-julgransflaggor**, grön m. vit stjärna**5 Julkort** med esperanto-text**5 Jul- och nyårskort** med esperanto-textAngiv endast: "Julpaket, 2 kr.", och vi exp. Läger Ni till 1 kr. sända vi även en **esperantostjärna** för Edert rockslag eller Er klänning.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 19071 - Stockholm 19 - Postgiro 578

— Oni arestos nin, se vi ne havigos la monon.

— Mi ne havas monon, kaj mi bone scias, ke mi neniam skribus mian nomon jeambio, se mi scius, ke la nomo de Hag estas falsigita!

— Provu kredigi tion al la juĝisto. Morgaŭ laambio estu pagita, kaj mi ne havas eĉ unu oeron. Estas cetere plej bone eniri al la sinjorinoj. Aliokaze ili maltrankviliĝos.

Dahl eliris el la ĉambro, kaj Wern sekvis lin. Ŝajnis al li kvazaŭ la planko balanciĝus sub liaj piedoj, kaj la muroj ĉirkaŭ li blankkalkiĝus, kaj la fenestroj ekposedus malgrandajn kradojn.

Oni vere kredus, ke li festus studentjubileon. Kiam Wern kaj Dahl envenis en la salono ili ekstaris mirigitaj. Antaŭ ili staris Georg Bent, kaj li rigardis iliajn surprizitajn mienojn. Li ne estis tiu Bent, kiun ili vidis antaŭ unu jaro, sed forta kaj bone vestita viro.

— Vi aspektas surprizitaj li diris. Sed kio okazis pri vi, Wern? Vi ja havas tute grizan vizaĝon!

Wern ŝanĉeliĝis, sed fine, eksidante li diris:

— Vi devas scii la veron, Eva! Jes, ĉiuj devas scii la veron! Mi estas honesta homo! Mi ne skribis la nomon de direktoro Hag sur laambio... Ĉi tie li estas... Dahl. Ja estas certe, ke li faris min sia kompaniano, sed li ankaŭ estis diableca kontraŭ mi. Kaj nun ĉio estas perdita. Ni estas ruinigitaj, Eva! Nun mi alvokas la policon!

— Vi ne faru tion! kriis Dahl raŭke.

— Dum momento estis silente en la ĉambro, sed subite oni ekaŭdis la kvietan voĉon de Bent.

— La 25.000 kronojn mi pagos, tuj morgaŭ kiam la bankoj estos malfermitaj. Mi ĝojas, ke mi povas fari tion kaj eĉ per la mono de Wern. Jes, vi aspektas surprizita, Dahl, sed tiel granda komercisto kiel vi, nepre devas scii, kiel kolose bonege prosperas tiuj de mi eltrovitaj motoroj. Kaj por tio mi dankas al Wern. Kiam vi elĵetis min el via ĉambro, tiam helpis min Wern. Li estas en ĉi momento pli riĉa ol vi povas imagi. Sed nun mi supozas ke via kompanieco finiĝis. Mi venis ĉi tien por peti Wern esti direktoro en la motorkompanio de Bent. Kion vi diras, Wern?

— Mi... devas pensi pri la afero.

— Ne, diris lia edzino kaj iris al li. Ni ne pripensu ni akceptos.

— Jes, jes, murmuris Wern. Ni akceptas.

— Do, venu, diris Dahl al sia edzino. Tio estas la danko por ĉio kion mi faris! Ne forgesu la 25.000 kronojn morgaŭ!

La pordo fermiĝis. Sed Wern ekstaris kaj forte premis la manon de la lernejkamarado.

*El la sveda tradukis TureWedensjö.*

## LA VERDA FLAMO

"Esperanto-gazeto por ĉiuj"

Tre interesa enhavo, varia artikolaro, instrua, distra, informa.

Abonkotizo: Kr. 4:50

Mendu ĉe

Förlagsföreningen ESPERANTO, Stockholm 19.

Adreso de la redakcio: La Verda Flamo, Casa-blanca, Place Mermoz (Imm. Chicot), Maroko.

## IEL respondas

La Unua Balkana Esperanto-Konferenco, kiu okazis en Assenovgrad la 26an de aŭgusto 1946, i. a. postulas, ke IEL "ŝanĝu sian pasivan, neŭtralan sintenon rilate faŝismon kaj reakcion".

IEL respondas (en la novembra numero de "Esperanto Internacia"):

Se IEL ne aktive sin okupas pri "kontraŭ-faŝismo kaj reakcio" tio estas laŭ la volo de ĝiaj membroj.

Sed tio ne signifas, ke la plimulto de la membroj private ne estas kontraŭ la faŝismo kaj la reakcio.

Tio signifas, laŭ nia interpreto, ke ili deziras, ke IEL sin dediĉu al la praktikaj taskoj propagandi Esperanton, kunligi la Landajn Asociojn, fari sian eblon akceptigi Esperanton kiel eble plej baldaŭ, kaj fari diversajn servojn al siaj membroj.

La Estraro de IEL tute ne havas mandaton de la membroj, ke la organizaĵo sin okupu pri iuj politikaj okazaĵoj en kiu ajn parto de la mondo. Tio ne estas ĝia agadkampo, kiu cetere estas klare difinita.

Ni tial insiste ripetas, ke IEL estas tute demokrata organizaĵo, sed neŭtrala, kaj tiel longe kiel ĝiaj membroj volos, ĝi konservos tiun koncepton pri neŭtraleco, kiun ĝi ĝis nun havis, ne por la profito aŭ malprofito de tiu aŭ alia sekcio de la movado, sed por la bono de Esperanto, kiu estas ĝia sola celo.

## Studentaro kaj Lingvo internacia

En aŭgusto de la nuna jaro okazis la dua Tutmonda Studento-Kongreso en Praha. Okazis grava instigilo, kiu kaŭzis, ke unu el la Kongres-Komisionoj tuŝis la problemon pri internacia helplingvo kaŭze de memorandumo de la Studenta Esperanto-sekcio de la Bulgara Ĝenerala Studenta Popola Asocio.

Ĉeĥa ĵurnalisto eniris la kongresejon kaj rakontas pri tiu vizito:

Tiu parto de la delegitaro—kunveninta el ĉiuj mondpartoj—kiu ne komprenis la lingvon tiumamente parolatan, babilis, manĝis, skribis privatajn leterojn kaj efektive amuzis sin, atendante ĝis kiam aŭdiĝos lingvo, kiun ĝi komprenas. Kompreneble tiu cirkonstanco iom ĝenis la aliajn delegitojn.

Poste li intervjuis la gvidanton de la kongreso kaj redonas tion jene:

Jen la Demandoj kaj Respondoj:

D. Kion postulis la letero de la Bulgara Studenta Esperanto-sekcio? R. La letero postulis, ke la Kongreso permesu oficialan uzadon de Esperanto en la Kongresaj diskutoj, apud la naciaj lingvoj. D. Kiuj delegitaroj partoprenis la diskuton pri Esperanto? R. La Rusa, Angla, Franca, Bulgara, Hinda, Sud-Afrika kaj eble aliaj, kiujn mi ne memoras. D. Kia estis la konkludo el la diskuto pri Esperanto? R. Ĉiuj delegitoj de la kunsido havis la opinion, ke Esperanto ne estas nun sufiĉe popularigita, t. e. disvastigita, precipe ne inter la kongresdelegitoj.

## LINGVA KOLONO.

### Pri apostrofo.

Mi volas nur ankoraŭ pli emfazi ke la ofteco aŭ troeco de apostrofoj povas ĝeni kaj malbeligi, sed ne tiom la apostrofa signo per si, kiom la elizio mem, la stumpigitaj kaj kripligitaj vortoj. Imagu nur kiel treege malfacile estas kapti la enhavon *aŭskultante* poemon deklamatan, se abundas elizioj, dum la finvokaloj moligas kaj glatigas la versojn. Mi ne komprenas kiel la apostrofoj povas ĝeni pli ol akcentaj kaj aliaj supersignoj, komoj, ekkriaĵaj signoj k.t.p. Ankaŭ en sveda kaj alilingva poezio okazas apostrofado kaj en la franca la apostrofado ja estas kutimo kaj regulo ankaŭ en prozo. Mi estas konvinkita ke neniu kuraĝas aserti ke la multaj apostrofoj detruas la belecon de franca poezio. Kial do en Esperanto?

Al ĉiuj, kiuj havas veran intereson pri ĉi tiuj aferoj, mi konsilas legi §§ 651—653 en Praktisk Lärobok i Esperanto de Butler-Jansson. Tio eble estas la plej prudenta, kio estas dirita pri poezio kaj traduko de poezio en Esperanto. Pro manko de loko mi volas ĉi tie citi nur jenajn frazojn (kursivigoj de mi!):

*"Evidu kiom eble la elizion! La senvostigo estas barbara kutimo!"* — *"Se vi devas traduki, elektu tekston ritme konvenan (t. e. kies linioj plejparte finiĝas ine...), ĉar pro la strukturo de la lingvo, Esperanta poezio estas nature ina. La sveda poezio, kontraŭe, estas pliparte vira, kaj ĝin traduki samritme necesigas oftan elizion."*

Koncerne la "legadon" de la Zamenhofa regulo. Oni ja kutimas diri ke eĉ la diablo povas legi la

biblion tiel ke ĝi konvenas por liaj celoj. Vere estus terura danĝero por Esperanto, se la esperantistoj povus "legi" la regulojn de la Fundamento ĉiu laŭ sia gusto kaj deziro. Se la intenco de Z. estis lasi al nia bontrovo meti aŭ ne meti apostrofon, mi estas konvinkita ke li estus formulinta la regulon en alia maniero, ekz. la fina vokalo de la substantivo povas esti forlasata. Tiuj, kiuj tion deziras, povas ĝin anstataŭigi per apostrofo. Sed tion li ne faris.

Rilate la elizion estas interese rimarki, ke Z. en siaj poemoj tre ŝpare uzas ĝin, kaj preskaŭ nur por eviti malagraban vokalrenkontiĝon, hiaton. En siaj tradukoj de poemoj (ekz. Lorelei) li eĉ ŝanĝas la originalan ritmon, uzante inajn rimojn anstataŭ virajn. Mi ne volas esprimi opinion pri tia tradukmaniero, sed tio klare montras ke li uzis elizion nur en okazo de plej ekstrema neceso.

Kaj nun mi nenion pli havas por diri pri ĉi tiu temo.

*Bigo.*

Por la rimarkigo, kiun faris Bigo pri la modo kontraŭfundamenta — unika en nia sveda gazeto — ignori la apostrofojn de finvokalo, mi volas danki lin.

La Fundamento estas reciproka kontrakto inter ĉiuj esperantistoj. Kiu ne obeas ĝiajn regulojn, tiu ne uzas korekte la lingvon, rompas la kontrakton kaj ofendas la kunkontraktulojn.

Pri aliaj aferoj esperantistoj — prozuloj aŭ poetoj — povas havi diversajn opiniojn; la dek ses regulojn Fundamentajn oni ne "interpretas", ilin oni nur obeas, laŭspirite kaj laŭvorte.

*P. Nn.*

Nominativa substantivo sen o estas *vorto*, ne "stumpigita" aŭ "kripligita" vorto. Ĝi estas en prozo uzebla en kunmetitaj vortoj kaj en poezio kie ajn. — La diferenco pendas sur la najlo de la akcento, kiun en poezio la ritmo garantias. Se ne, uzu apostrofon — en la fino de verso, dankaldio, neniam bezonan.

Verku laŭ la ina karaktero de la esperanta lingvo, Bigo volas diri. — Bone, sed tio ne ĉiam estas ebla koncerne tradukon de poezio. Poezia traduko, kiu ŝanĝas la ritmon de la originalo ne estas traduko, sed krimo.

Por eviti tion Zamenhof donis al ni la rimedon. (Ke li mem faris tian krimon, nur montras ke ankaŭ genio estas homo.)

La reguloj de lernolibro estas donitaj al lernantoj. Apud Bigo kaj P. Nn. ni certe ĉiam restos en lerneja ĉambro. La gazetaro tamen eliris sur la literatura strato kaj volas tiujn minutojn vivi kiel plenkreskulo ĝuante la limigitan liberecon de plenkreskulo (kaj stratbubo) — Stulta deziro, sed ne detruenda.

*Teodor Julin*

### Fakterminaroj.

Rilate al la artikolo "Krei fakterminarojn..." Brodkasti ne estas sama kiel dissendo, ĉar oni povas "dissendi" aferojn tute ne brodkastante. Kaj radie-dissendi estas iom longa. Flosi laŭ Zamenhofa uzo estas *verbo transitiva*: "oni flosas lignon al la

Kelkaj delegitoj opinias, krome, ke nun ne estas oportune paroli pri internaciismo, kiel ekzemple pri lingvo internacia, en la Kongresaj kunsidoj. La nuna Kongreso havas pli gravajn laborojn kaj oni povas prezenti ĉi tiun demandon al iu venonta kongreso. D. Kia estis tamen la ĉefa kaŭzo, ke la komisiono en tiu ĉi kongreso ne akceptis uzadon de Esperanto en la interstudenta rilatado? R. La plej grava kialo estas la cirkonstanco, ke neniu delegito scias kaj uzas Esperanton. D. Ĉu ankaŭ la Plenkunsido traktis pri Esperanto? R. Ne. D. Ĉu vi povas konsili al Esperantistoj la plej efikan manieron por interesigi la studento-organizaĵojn pri Esperanto? R. Volonte. Skribu petskribon al la Ekzekutiva Komitato de la Konsilantaro de la Internacia Federacio Studenta, kies daŭra sidejo estas en Praha II, Opletalova 38, Ĉeĥoslovakujo, en kiu vi rekomendos lernadon de Esperanto kaj postulos, ke la Administra Komitato prezentu al la venonta kongreso proponojn, ke Esperanto estu akceptata kiel oficiala kongreslingvo. Sed kondiĉo estas, ke la petskribo estu sendata de studentaj grupoj aŭ organizaĵoj, aŭ de studenta sekcio de landa asocio, do, sole de studentoj-Esperantistoj. Petskriboj de nestudentoj estas sensignifaj. Krome estas grave, ke la petskribo estu skribita en nacia lingvo, ne nur en Esperanto, aŭ pli bone, en kelkaj lingvoj samtempe; sed ĝi devas esti subskribita de studenta organizaĵo.

## Något mer om *Universala Ligo*

Alla, som något djupare gripits av Zamenhofs uppoffrande och oegennyttiga livsgärning, måste av hjärtat glädja sig åt bildandet av detta nya förbund med namnet *Universala Ligo*, för vilket delvis redogjorts i de två närmast föregående numren av vår tidning. Detta nya förbund är nämligen en organisation helt i Zamenhofs anda. Det höga mål åt vilket Zamenhof vigde sitt liv, var folkförbrödning, och det av honom skapade internationella språket esperanto ansåg han själv blott som ett medel, ett verktyg att vinna detta mål. Detta är också den anda, i vilken det nya förbundet vill arbeta.

Utifrån denna grundsyn har det nya förbundet även skapat villkoren för medlemskap. Dessa äro synnerligen lätta: var och en, som skriftligen godkänner förbundets mål och principer samt därjämte betalar en frivillig engångsavgift, dock ej mindre än 1 stelo — en stelo är för närv. = 0.35 kr. i svenskt mynt — blir medlem och erhåller ett individuellt medlemskort gällande för livstiden. Denna ringa medlemsavgift är fastställd, för att ingen av ekonomiska skäl ska behöva stå utanför. Dessutom finns andra frivilliga medlemsformer för dem, som kunna och vilja mer kraftigt ekonomiskt stödja verksamheten. En särskild medlemsform är "Aktiva membro". De medlemmar, som årligen betala ytterligare 24 steloj, tillhöra denna grupp, och de erhålla förbundets tidskrift gratis jämte andra förmåner.

På grund av särskilda svårigheter i Nederländerna just nu, däribland även stor pappersbrist, och för att undvika onödiga kostnader och arbete har förbundets styrelse för innevarande år provisoriskt övertagit den kända tidningen *La Praktiko* från Cseh-institutet som förbundsorgan. Den är till omfång och utstyrsel lite enkel, vilket redaktionen själv beklagar, men innehållet är mycket gediget och intressant. Det är meningen att 1947 utbyta denna tidning mot en ny månatlig av större omfång och fullgod utstyrsel och med namnet *La Nova Mondo*.

Det skulle vara synnerligen glädjande, om alla esperantister utan undantag ville ingå i det nya förbundet som medlemmar av det ena eller andra slaget. Och alla kunna göra detta utan att på nå-

*maro.*" (Angle "raft"). Sed por la netransitiva signifo "resti sur la surfaco de la akvo" (Angle *float*, kaj internacie *flot*... k. s.) flot-i ŝajnas necesa.

Mi tre bedaŭras vidi en via gazeto ne-Esperantajn formojn Anglio, Belgio... malrekomenditaj de la Lingva Komitato kaj de Zamenhof mem. La landon Anglio mi ne konas. Mi estas Anglo loĝanta en Anglujo.

M. C. Butler.

Rilate al Anglio, Belgio... estas ja inter geografoj ĝenerale konate, ke "ŝatata infano havas multajn nomojn", kaj malplej uzata estas la nomo hejme uzata.

Red.

got sätt behöva komma i motsättning till den esperantoorganisation, som de eventuellt tidigare tillhöra.

För att nu från början få fart på denna medlemsanslutning till *Universala Ligo* är det önskvärt, att alla klubbar omedelbart ville taga upp denna fråga till behandling. Ett lämpligt förfarande vore att inom varje klubb välja en särskild funktionär, som hade det direkta arbetet med detta ärende om hand. Klubbarna böra särskilt vända sig till alla esperantorörelsens "avfallingar" för att få dem med i den nya folkförbrödringsorganisationen och ånyo bliva aktiva esperantister.

Vidare borde åtminstone någon, exempelvis den nu nämnde funktionären, men naturligtvis helst flera, tillhöra medlemsgruppen "Aktiva membro" för att ha tillgång till förbundets tidning och därigenom kunna förmedla kontakten mellan klubben och förbundet.

Må vi nu var och en i sin stad göra vad vi kunna för att stödja denna nya esperanto- och folkförbrödringsbefrämjande organisation. Därigenom hedra vi bättre än på något annat sätt minnet av vår store mästare, vårt höga föredöme i arbetet för fred och folkförbrödning, människovännen *Ludoviko Lazaro Zamenhof*.

Hjalmar Kihlberg

## HOPPET

(efter L. L. Zamenhof)

Ny är känslan, som nu skakar världen.  
Över jorden som ett starkt rop går den.  
Lätta vindars andevingar bär den  
ifrån plats till plats, och alla når den.

Ej till det på blod begivna svärdet  
drar den mänskosläktets individer.  
Helig harmoni, det största värdet,  
lovar den en värld som evigt strider.

Under hägn av hoppets helga fana  
fylkas fredliga soldater samman.  
Saken växer snabbt på framgångs bana  
genom optimisters flit och gamman.

Sedan tusenden av år stå murar  
fasta mellan skilda folk och stammar.  
Falla skall de dock för pilregns skurar  
från den helga kärleken, som flammar.

På det neutrala språkets grunder,  
där den ene klart förstår den andra,  
kunna folken bilda ett förbund, där  
de som *en* familj får samman vandra.

Ej förtröttas skall vår trägna skara  
i sin strävan, fredlig men dock märklig,  
till dess tanken, som är dröm nu bara,  
— mänsklighetens bästa — blivit verklig.

Skövde den 6.11. 1946.

Nat. Svanholm.

Kiel la samideanaro povas observi, niaj svedaj amikoj pere de la versaro de s-ro Svanholm povas akompani nin, kiam ni kantas nian himnon.



## Ernst Bepperling

hejmenveturos de Svedlando al Hessen. — Jam en nia junia numero li adiaŭ-salutis nin. En sveda lingvo li esprimis sian ĝojon kaj siajn esperojn por la estonto de sia patrolando. Sed nia nova mondo ne nur postulas pasporton kaj bileton sed ankaŭ specialan militestran permeson. Tiu permeso nur nun venis, kaj post kelkaj semajnoj nia amiko estos hejme. Preskaŭ 13 jarojn li restis ĉe ni, fuĝinto el la ungegoj de nazio, kaj la modesta, sed lerta samideano ricevis ĉi tie tiom da amikoj kolektitaj ĉirkaŭ li kiom da lernantoj de lingvoj aŭ matematiko kaj aŭskultantoj de ĉiam interesaj kaj enhavoriĉaj prelegoj.

Novan feliĉon ni deziras al li esperante ke li gardos de Svedlando iom da bona memoro spite de malluma tempo, kiun li ĉi-tie travivis. *Jln*

### TVARS ÖVER HAVEN.

"New Zealand Esperantist" berättnar i sitt julnr, att barnen i folkskolan i Makarau, Norra Auckland, sammanställde en dossier, där varje blad uppvisade något, som barnen ansågo vara karaktäristiskt för sitt land. Det blev blad med växter, löv, teckningar av djur, etiketter från nyseländska industrier, frimärken, landskapsbilder och naturligtvis bilder av maoris och prov på maori-konst. Till allt gjorde barnen texter på esperanto. Sedan hela samlingen ställdes ut i skolan, sammanfogades bladen till ett album och sändes till en skola i Montpellier i Frankrike. Där blev det ny utställning — i självaste stadsteatern — och tävlingen bland barnen att åstadkomma lika vackra blad. Det blev två tjocka häften, vars blad nu pryda skolan i Makarau, där just en ny dossier är under arbete. Denna skall gå till en skola i Finland.

### NOVA ZELANDO.

La 12a Novzelanda esperantokongreso okazos en Auckland la 2—3 jan. 1947. La programon oni promesis presi en la sept.-nro de la Bulteno de la landa asocio. Ĝi ankoraŭ ne alvenis al Svedlando.

### ITALIEN.

I Syrakusa har bildats "Katolika Esp Asocio Sankta Petro" som valt till ordförande kyrkoherde Luigi Scata.

La Universala Akademio de la Regado Kosmo-Astrozofia har antagit esperanto som korrespondensspråk och anmäler sin nya adress: UARKA, Trieste, Via Carducci 12, Italien.

### TJECKOSLOVAKIET.

De som äro intresserade för återupprättande av den esperantiska "Scienca Revuo" (Vetenskaplig revy), ombedjas tillskriva S-ro Jaroslav Hanuš, Kladno 1997, Tjeckoslovakiet.

### KINA.

Esperantisterna i Ĉengtua ha samlats efter kriget och bilda "Ĉengtua Esp-Ligo" samt ordnat två utställningar, vilka resulterat i 5 kurser och ett högt skattat medgivande av stadens radiostation om esperanto-utsändning en gång i månaden.

### ÖSTERRIKE.

Internationella Esperanto Museet, vars alla samlingar man lyckas rädda undan den allmänna förödelsen, har nu ånyo öppnats i Wien.

### Naskiĝis.

La 21an de novembro naskiĝis nia dua filineto. Lilly kaj Einar Hult, Boställsvägen 9, Arvika.

La red. gratulas.

Hodiaŭ nia vivo pli riĉiĝis pro naskiĝo de nia filino kaj fratinetto Willemina, ŝin tut kore bonvenigis ŝia patrino W. De Vries-Colenbrander, ŝia patro Foeke De Vries, kaj ŝiaj fratoj Ferrie, Dirk, Karel. —Amsterdam, 13-9-'46. Insulindeweg 158.

Signe kaj Arthur Axelsson, Karlskoga, sciigas siajn amikojn pri la naskiĝo de filineto Gudrun Linnea la 15-an de novembro 1946.

Plej lumoriĉan Kristfeston kaj feliĉoportan Novjaron deziras al la samideanaro

Tiberiu kaj Dorica Morariu, Tegelbacken, Stockholm.

Belan feston, feliĉan, rezultoriĉan novan jaron deziras al ĉiulandaj amikoj

Rose kaj Ferenc Szilágyi, Tredje Villagatan 26, Borås.



### Scouter

Enligt meddelande från Frankrike pågår kurser i olika språk för att ge de franska scouterna möjlighet att komma i personlig kontakt med de utländska scouter, som besöker världsjamboréen i Frankrike kommande sommar. Ett förhållandevis stort antal scouter studerar för detta ändamål esperanto. De svenska scouter, som kan korrespondera på esperanto och som i förväg önskar komma i förbindelse med de franska värdarna, uppmanas tillskriva den franska brevcentralen för esperanto-talande scouter: S-ro Jouis, 46 Rue Pascal, Rouen (Seine Inf.), Frankrike.



## Flit på fritid

Vid en utställning, som anordnats av fritidsorganisationer i Borås under mottot: "Flit på fritid" hade de båda esperantoklubbarna i Borås gemensamt anordnat en monter, som fått en mycket



fördelaktig placering och tilldrog sig mycket stor uppmärksamhet. Tyvärr gör det medsända fotot inte full rättvisa åt den mycket vackert arrangerade montern. Mittpartiet, som utgjordes av vykort från alla världens hörn, var en sprakande färgsymfoni, vilken inte lämnade ens den mest uppmärksamme oberörd.

Utställningen besöktes av mer än 15000 personer.

## Gåvopaket

Denna höst har till SEF från svenska esperantister insänts omkr. 250:— kr. att användas till gåvopaket till utländska meningsfränder. För de insamlade medlen har nu paket sänts till Ungern, Österrike och Tyskland.

Då licens för stora varupartier ej längre beviljas, bör hädanefter de svenska esperantister, som ha personliga vänner i utlandet, sända småpaket direkt till dessa. Närmaste poststation ger upplysningar.

Obs! Om Ni erhåller begäran om gåvopaket från obekanta esperantister, så sätt Er först i förbindelse med SEF, som har möjlighet att undersöka hjälpbehovet. Det har nämligen hänt att man från visst håll (t. ex. "Edelweiss" i Greiffenburg, Österrike) organiserat böneskrifter fullt affärsmässigt till samtliga svenska klubbar och kända esperantister. Skulle dessa mer allmänt bifalla begäran, skulle utan tvivel en orättvis fördelning av paketen äga rum. SEF har beträffande Ungern, Polen och Österrike träffat överenskommelse med därvarande centrala Esperanto-organisationer om en rättvis fördelning av gåvopaketet.

## Stokholma aŭtuno

Vi diris, ke tri monatoj ne sufiĉas por ekkoni iun, kaj ke vi ne konas vin mem... Plej ofte vi ŝprucis vivgajon ĉirkaŭ vi, iufoje estis melankolie malkontenta pri vi mem...

Sed ne serĉu ĉiam ekvilibron; la ĉiama ekvilibro ne troviĝas ĉe la homoj, ĉar ĝi mankas en iliaj animoj. Kelkaj sukcesas atingi ĝin pere de la religio, aliaj pere de l' arto kaj scienco, kiuj ebligas por tempeto akiri *Harmonion*.

Poste la senĉesaj movoj de l' mondo kaj animo rompas tiun harmonion, kaj la homo devas denove ascendi sian rokon. Ĉi ŝvebado ĉirkaŭ fiksa punkto — estas la *Vivo*. La konscio, ke ĉi punkto ekzistas, estas la *Feliĉo*.

Estas tute same se oni dividas en momentojn la plej belan *Amon*: ĝi konsistas el sennombraj miskomprenoj, etaj konfliktoj, kiujn ĉiam forigas la *Konfido*.

Se oni dispartigas la feliĉon: ĝi konsistas el batalo kaj turmentoj, sed ĝin eterne konservas — la *Espero*. Ĝis kiam konfido kaj espero estos reciprokaj, daŭros ankaŭ nia *Amikeco*.

Nun vi verŝajne demandos: sed kio estas konfido? Mi mem ne scias klare. Por unuj estas nura kutimo, eĉ obstino. Por aliaj kolekto da helaj, semajnofinaj *memoroj*, kristaliĝintaj dum labortagoj:

pedetoj, promenataj sur tapiŝo teksita de l' Aŭtuno el falinta foliaro ĉe Djurgården;  
solsola ruĝflava folio, kiu lastforte klopodas rezisti ventojn sur arbopinto;  
pluveroj kvazaŭ orependaj perloj pendantaj de arbobranĉaj ekstremo sur lunluma vojo ĉe Alsten;  
lumkopio de fenestro desegnita de la radioj de l' subiranta suno sur internan, malhelan murflankon en l' antikva kastel' de Upsala;  
nebulo ĉe Tegelbacken, kiun subite trablondas kara kapeto;  
adventa kandelego ekbruligita de mallarĝa, gracia maneto por lumbrili tutjare en "hejmo" de solulo...

... Jes, konfido solidigas la vivon kaj donacas al ĝi firman kaj rektlinian trajton; ĝi spitas niajn ribelojn, forpelas nian timtremon, transformas nian malforton en forton. Konfido estas pli ol nura punkto apoga, ĝi estas nia konsolo.

Kaj la *Espero*? Mi apenaŭ povas klarigi tion al vi. Sed iru foje, vespere al la fenestro kaj malfermu ĝin larĝe, profundigu viajn okuldiamantojn en la densan kaj silentan nokton, poste direktu vian rigardon en la foran alton kaj lasu vian animon sekvi ĝin, kaj vi trovos ĝin:

La espero estas Stelo...

IO-IU.

## La infanoj de Betlehem

de SELMA LAGERLÖF

Den vackra pärlan bland Kristuslegender.

Pris 75 öre

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 19071, Stockholm 19

**Esperanto kaj****U N E S C O**

Dum kelkaj monatoj la provizora sidejo de la Eduka, Scienca kaj Kultura Organizaĵo de la Unuigitaj Nacioj troviĝis en Londono. (En la cetero de ĉi tiu raporto ni uzos la nomon UNESCO, la oficiale akceptita mallongigo laŭ la komencliteroj de la Angla nomo de tiu organizaĵo). En Majo 1946 la Internacia Esperanto-Ligo starigis kontakton kun tiu organizaĵo pere de la Brita Esperantista Asocio. Multe da informa materialo estis prezentata, kaj okazis intervjuo.

En la fino de Septembro UNESCO translokiĝis al sia konstanta sidejo en Parizo. Post perkoresponda prezento de novaj faktoj, S-ro E. D. Durrant vizitis Parizon nome de I. E. L. kaj estis akceptata ĉe UNESCO de D-ro Awad, Estro de la Fako pri Sociaj Sciencoj, kiam pli da faktoj estis prezentataj kaj diversaj flankoj de la Esperanta movado estis diskutataj. La sekvanta estas traduko de la teksto Anglalingve interkonsentita la 24an de Oktobro kiel deklaro pri la fakta sinteno de UNESCO rilate al la internacia helplingva demando kaj la Esperantomovado: —

"Estas komprenite, ke estas en la intereso de de UNESCO fari pristudon pri ĉiuj klopodoj, kiuj celas al la enkonduko de internacia helplingvo.

"Ĉi-tiurilate UNESCO prezentas en la nuna tempo, kaj verŝajne prezentos dum kelka tempo, neŭtralan sintenon koncerne ĉi tiujn klopodojn.

"La Internacia Esperanto-Ligo, nome de siaj kunlaborantaj organizaĵoj ĉiuspecaj estas informinta UNESCO-n pri la internacia petskribo por Esperanto kaj jam prezentis preparan informaron. Ĝi daŭre kunlaboros ĝis sia povo por helpi al UNESCO havigi al si ĉiajn informojn rilate al Esperanto, kaj tion faros en tuta kunlaboro kun ĉiuj Esperantaj organizaĵoj, por kiuj ĝi havas rajton paroli.

"Ĉi tio neniel malhelpos al kiu ajn Esperanta organizaĵo, kiu mem preferas prezenti rilatajn faktojn en sia propra nomo, sendepende de la kialoj, kiuj eble decidigos ĝin tiel agi.

UNESCO estos regule informata interalie pri la progreso de la Petskribo ĝis ĝia fina prezento en komune taŭga momento. Intertempe, ĉi tiu novaĵo estu instigo al ĉiuj Esperantistoj eĉ pli intensigi siajn klopodojn kolekti subskribojn. Estas aparte dezirinde, ke oni ricevu la apogon de eksteraj organizaĵoj per alpreno de rezolucioj laŭ la teksto de la petskribo aŭ en simila senco. Se oni sukcesos en tio, oni estas petataj urĝe sendi plenan raporton kun ĝusta traduko de la rezolucio, se ties teksto ne estas la sama kiel en la petskribo.

Oni sendu la informojn rekte al S-ro E. D. Durrant, 18 Romeyn Road, London S. W. 16, Anglujo, kiu respondecas pri la kolektado de informaro laŭ interkonsentita sistemo por posta prezento al UNESCO.

*C. O. Goldsmith,*  
Sekretario de I. E. L.

**Radio**

**VARJE DAG:** 21.00—21.30, Praha (Tjeĉkoslovakien) 49,92 m (lördag, söndag och måndag även på långvåg 1571 m). "Informado pri politiko, kulturo, ekonomio kaj sporto. Muziko." Radiostacio, Esperanto-servo, Stalingstrato, PRAHA XII, Ĉeĥoslovakio.

**Måndag:** 22.10, Warszawa III 49,06 m. Politikaj informoj. Esperanto-sekcio de la Pola Radio, Koszykowa 8, Warszawa.

23.50—24.00 Praha I 470 m. Föredrag, intervjuer, teaterscener, sång och meddelanden om esperantorörelsen.

**Tisdag:** 19.50—20.00, Sofia 32,09 m. Nytt från Bulgarien. Radio Sofia, Esperanto-sekcio, SOFIA, Bulgario.

23.50—24.00, Ostrava (Tjeĉkoslovakien) 325 m. Informationer. Brevlåda. — Radistostacio, OSTRAVA, Ĉeĥoslovakio.

**Onsdag:** 19.30—19.40, Regiona Stacio Ĉeĥoslovaka 280 m. Esperantoprogramo.

**Torsdag:** 18 55, Bern (Schweiz) 31 m. "Federalismo kaj paco", korta anföranden av dr Edmond Privat.

23.50—24.00, Praha I 470 m. Se **måndag!**

**Fredag,** 19.50—20.00, Sofia 32,09 m. Se **tisdag!**

20.45, EAJ 14 (Spanien). Radio Castellón 200 m. Kurs.

21.30—21.45, B.N.R.O. Kortrijk (Belgien) 202 m.

Föredrag. Zender Kortrijk van de B.N.R.O., Rijselstr. 36, KORTRIJK, Belgujo.

23.50—24.00, Ostrava 325 m. Se **tisdag!**

**Lördag:** 17.30—17.45, Wien (Österrike) 506 m. "Somera kurso de Esperanto." Därefter nyheter på esp.

18.30—18.45(?), 3 SR (Australien) 238 m. Nyheter. Endast andra lördagen i varje månad.

19.00—19.45(?), PRA 2 (Brasilien). Föredrag om esperanto. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praça da Republica, RIO DE JANEIRO, Brazilo.

21.00—21.30, PRI 3 (Brasilien) 49,75 m. Om livet i Brasilien. "Brazilia kroniko". Radio Inconfidência, BELO HORIZONTE, Minas Gerais, Brazilo.

\*

Alla klockslag är angivna enl. den mellaneuropeiska tiden (som gäller i Sverige). I ett par fall saknas uppgift om det tidssystem, som använts vid angivandet av sändningstiden. Detta utmärkes medelst (?) i tabellen härövan.

**Hilversum.** Vendrede la 20an de decembro 1946 okazos espo-elsendo el Hilversum 415 m. Nederlanda Kristana Radio-Asocio aranĝas kaj la adreso estas: NGRV, afd. Omroep, Postbus 5, Hilversum, Nederlando.

**Sveda radio** per mallonga ondo 19,80 m la 16 dec je 16,10 laŭ mezeŭropa tempo.

Por ekstereŭropaj landoj la programo estos ripetata la postan tagon, 17 dec, je 1.10 laŭ Grenviĉa tempo per mallongaj ondoj 31,6 kaj 49.46 m.

Aliaj Esperanto-gazetoj bonvolu represi!

Radio-stacio Hilversum I, ondolongo 301 metroj, la 14an de decembro, je horo 16.25—16.40 (mezeŭropa tempo) disaŭdigos esperantlingvan paroladon kun titolo:

**Memoroj pri D-ro Zamenhof.**

Parolanto: W-F. Kruit; deklamo de A. L. de Bruijn.

Sendu aprobon al Radio-V. A. R. A., postbus 175, Hilversum, Nederlando.

**Bela Esperanto-libro senpage.**

Radiostacio Ostrava aranĝas konkurson. Via tasko estas skribi al la radiostacio: 1. kion vi pensas pri Ĉeĥoslovakio? kaj 2. kio vin interesas el la nova vivo en Ĉsl. Respubliko? — Interesajn le-

## EL FINNLANDO.

La abonprezo por La Espero ekde 1947 estos 170 mk, pagota al la poŝtgirokonto N:o 60253, s-ro Joel Vilkkii, Somero.

### Deviga instruo.

Esperanto estas deviga instrufako en popollernejo en **Kullaa**, Levanpelto. Oni instruas la Lingvon en superaj klasoj: V, VI, VII, VIII. La klasoj V kaj VI havas 1 lecionon posemajne, kaj la klasoj VII kaj VIII 4 lecionojn posemajne.

La direkcio de la Kullaa lernejo proponis Esperanton kiel devigan instrufakon en sia "Instrua-plano", kiun la popollerneja inspektoro aprobis. La administrantaro de la geknaba liceo en Somero, Finnlando, unuanime proponis Esperanton kiel devigan instrufakon por sia lernejo sed la Administracio ne akceptis la lecionplanon. Do la rektoro de la liceo, s-ro Joel Vilkkii, daŭrigas siajn libervolajn Esperanto-kursojn kiel en multaj antaŭaj jaroj.

Esperanto-gelernantoj en la popollernejo de **Kullaa**, Levanpelto, estas sume 31, kaj ili estas 10—15 jaruloj.

La gelernantoj volonte korespondus kun eksterlandaj samaĝuloj, komence nur poŝtkarte, sed en printempo jam eble ankaŭ letere.

Adreso: La gelernantoj, **Kullaa**, Levanpellon koulu, Finnlando.

Estus interese aŭdi, en kiel multaj lernejoj Esperanto jam estas deviga instrufako. Laŭaŭde en iu lernejo en la urbo **Oulu**, Finnlando, ĝi jam estas deviga fako.

Samideane salutante!

T. M. AURELA

esperanto-instruisto, Kullaa

## LITERATURO.

*Jarlibro de IEL 1946* estas preta, kiel ni jam sciigis, kaj venis en du partoj kiel kutime. La unua parto venis en la komenco de la jaro, kaj antaŭ kelkaj semajnoj venis la dua.

La jarlibro estas nia monda adreslibro donanta aktualajn sciigojn pri niaj preskaŭ 2000 esperanto-konsuloj en la tuta mondo. La granda listo sin trovas en la unua parto de la jarlibro kaj estas kompletigota per 34-paĝa aldonlisto en la dua parto. La fakdelegitojn oni ankaŭ trovas en tiuj listoj, kaj pri ili troviĝas speciala laŭfakte alfabeto registro.

Krom tio la jarlibro enhavas tre interesajn landajn raportojn, bedaŭrinde ne multajn, sed ni esperu, ke en venontaj jaroj tiaj tre valoraj raportoj venos pli grandnombre.

En la dua parto IEL donas al ni novan fakan terminaron, por ĉiu homo bezonatan, nome "Leĝa

terojn oni publikigos en ĉeĥa gazetaro. Ĉiu samideano, kies letero estos publikigita, ricevos ekzempleron de la gazeto kun lia artikolo kaj Esperanto-libron. Oni petas skribi sincere kaj koncize. Sufiĉas kelkaj koncizaj, sinceraj frazoj. Adresu al: Radiostacio Ostrava, Ĉeĥoslovakio.

### RADIOKURS.

Sedan 2 november sänder Belgiska Radion esperantokurs varje lördag kl. 14.00—14.10. Ledare är magister E. Symoens. Använda våglängder äro Brüssel 321,9 m och Kortrijk 202,3 m.

terminaro". La verkinto, dro A. Mildwurf, prezentas siajn 7 paĝojn kiel nur "fundamentan informon pri tiuj vortoj de la leĝa sistemo, kiuj verŝajne tuŝos ilin en ĉiutaga vivo." — Ĉiu aldono al niaj fakaj terminaroj estas kun danko akceptata.

### Laborista Esperantisto,

la organo de Sveda Laborista Esperanto Asocio, festas per sia novembra numero siajn 25 jarojn. Post ĉefartikolo de s-ro Ernst Eriksson skribas la unua redaktoro de la gazeto s-ro Einar Adamson (svedlingve) kelkajn pripensojn antaŭ la jubileo. La dana parto de la numero estas iom pli granda ol kutime kaŭze de propagando por la Aarhus-kongreso. Dro Szilágyi komencas artikolon "Mezeŭropa historio en leter-citaĵoj".

### VÄXJÖ.

Vid anordnadet av fritidssysselsättning åt eleverna i sjunde klasserna vid stadens folkskolor upptogs på hr Paul Jacobssons förslag bl. a. esperanto. Som kursledare kommer hr Jacobsson att pröva Einar Dahls lärobok i esperanto för folkskolan.

### Brila raporto.

El Falköping oni skribas: Pri la kluba laboro ni povas raporti la jenan: Ni aranĝis komencan studrondon en la popol-lernejo. La kurson partoprenas 25 gelernantoj laŭ gvido de instruistino Adele Sonderburg.

La kluba prezidanto, Harry Carlsson, gvidas kurson inter Junaj Agloj ĉiun jaŭdon. Dek du agloj partoprenas, kaj en ambaŭ studrondoj la intereso estas en la pint-punkto.

Ĉiun vendredon laboras daŭriga studrondo, kiun gvidas S-ro Kurt Rohdin.

### LUND.

Nia fervora samideano s-ro Anderberg sukcesis starigi 2 grandajn kursojn en popollernejo — ĝojiga, esperplena okazaĵo.

### MALMÖ.

6/11 La studrondo "La verda ringo" respondis por la programo. Oni kondukis la klubanojn al Lichtenstein kaj Paris por poste revenigi ilin mezen en streĉa dramo de hejma fabrikado. 20/11 fraŭlino Noll el Köpenhamn venis, vidis kaj venkis per prelego pri "Kompreno, nekomprene kaj miskompreno". 30/11 Kristfestfoiro.

### SKÖVDE.

31/10 la anoncita rapid-kurso por instruistoj komencis, kaj unu grupeto laboras kaj bone progresas. — Pri la popol-lerneja kurso oni sendas jenan interesan kaj praktikan raporton:

La rezulto bona: 27 knaboj (strange, nur knaboj) anoncis sin. Por *eviti* amasan aliĝon ni do devige petis

a) subskribon de la patro (aŭ patrino)

b) 1: — kronan kotizon.

Ni opinias, ke estas plej bone jam dekomence fari necesan "elekton". Do, la gepatroj devas decidi kaj krome unu kr. estas jam bona limigo. Jen niaj spertoj!

**32:a Universala Kongreso de Esperanto****PRI LA ALIĜO AL LA KONGRESO****Aliĝo:**

Nur aliĝilo kun samtempa pago validas.

**Restado kaj ekskursoj:**

Ankaŭ mendiloj por restado kaj ekskursoj validas nur kun la samtempa pago.

**Programo:**

La programo kaj ĉiuj detaloj pri la ekskursoj aperos en la unua numero de la kongresa gazeto.

**La kongresa gazeto**

"Svislando vokas vin" estos sendata nur al la kongresanoj, escepte la unua numero, kiu estos sendata al ĉiuj petantoj, korespondantoj, esperantaj gazetoj kaj esp. landaj asocioj en la tuta mondo.

La unua numero aperos je la fino de nov.

**Pasport-vizo:**

Por veturi al Svislando vi bezonos pasport-vizon, kiun vi ricevos ĉe la Svisa Legacio en via ĉefurbo.

**Korespondado:**

La Kongres-Komitato ne povas doni iun korespondant(in)on al vi. Turnu vin por tio al Korespondanta Centro, de SEF, Tegelbacken, Stockholm C.

**Tendkampo:**

Apud Bern troviĝas bela kaj bona tendkampo, nur 2 km. de la Kongresejo en Eichholz. Por eksterlanduloj ĝi estas tute senpaga. Eble troviĝos kelkaj tendoj por tiuj kiuj ne povos kunporti tendon. Luprezo 1 sv.fr. po nokto.

**FRANCUJO.**

La Franca Nacia Fervoja Societo respondas en Esperanto al ĉiuj demandoj pri la vojaĝoservo en Francujo. La adreso estas: Bureau des Renseignements, Gare St. Lazare, Paris. Skribu kaj skribigu por enradikigi Esperanton en tiu administracio.

**ADIAŬ**

Kiam mi en la aŭtuno 1938 prenis sur min la taskon kiel redaktoro de Sveda Esperanto Gazeto, mi tute ne komprenis, kiom da laboro estas ligita kun tiu posteno. Sed lasante per tiu decembra numero por la jaro 1946 la gazeton en aliajn manojn, mi ne volas pensi pri la laboro ne nur ĉiam kreskanta, sed dum la terura militempo pli kaj pli malespera. Mi nur volas pensi al ĉiuj bonaj amikoj de nia lingvo, kiuj sindone kaj sen rekompenco helpis al mi kaj al nia gazeto. Kaj precipe mi direktas miajn pensojn al la granda amikaro en la tuta Esperantujo, la landa kiel la eksterlanda, kiun la laboro donis al mi.

Al ĉiuj miaj helpantoj mi volas danki. Specialan dankon mi ŝuldas al mia edzo, Teodor Julin, kiu dum tuta mia redaktoreco estis mia apogo, nelaciĝanta, ĉiam prenanta sur sin la plej gravan laboron, nekompensita kaj nekompensebla. Sen lia helpo mi ne estus povinta resti kiel redaktoro la du lastajn jarojn, kiam mia malsano tre malfortigis min.

Al mia amiko Ferenc Szilágyi mi ankaŭ volas diri specialan dankon por lia ĉiama volemo doni al mi fidindajn konsilojn rilate lingvajn kaj literaturajn aferojn.

Tre ĝojiga estas la fakto, ke nia gazeto povis elteni la tutan militempon, kaj ke ĝi de nun havos eblecon aperi en konvena grandeco kaj kun nia bela verda stelo. Mia varma deziro estas, ke la nova redaktoro neniam estu devigata havi la malfacilan laboron eldoni tiajn maldikajn numerojn, kiajn la kriztempoj postulis, kaj kiuj ja neniel korespondis al la intereso kaj kunlaboremo de nia legantaro.

Per tio mi salutas mian lertan posteulon sinjoron Oskar Svantesson kaj deziras al li kaj al miaj legantoj bonajn novajn jarojn.

*Eva Julin*

**SEIF Kolono****Tutmonda adresaro.**

Ĉar ni ricevis informon, ke multaj svedaj esperantistoj ricevis cirkuleron pri "Tutmonda adresaro de la esperantistoj 1946" ni volas atentigi, ke tiu adresaro estas tute privata entrepreno, kiu ne ricevis la aprobon aŭ subtenon nek de la internaciaj nek de la naciaj asocioj.

**Nova redaktoro.**

Pro teknikaj kaŭzoj la estraro de SEF ĝis nun ĉiam elektis kiel redaktoron de nia gazeto personon, kiu loĝas en la loko, kie oni presas la gazeton. Ni nun estas devigataj cedi je tiu principo pro la neebleco trovi redaktoron en Stockholm. Anstataŭe la estraro elektis s-ron Oskar Svantesson en Göteborg, kiu estas aktiva esperantisto ekde multaj jaroj kaj energia ĉefo de la gazetinforma servo de SEF. Tiu aranĝo certe enhavos diversajn teknikajn malfacilaĵojn, sed ni esperas, ke ili estos venk-

eblaj. Ni do kore bonvenigas s-ron Svantesson al la redaktora posteno kaj deziras al li bonan sukceson!

*La estraro de S. E. F.*

**Esperantokurs i Brunnsvik.**

På förslag av Esperanto-Institutet har Arbetarnas Bildningsförbund beslutat att på sin folkhögskola i Brunnsvik anordna en instruktionskurs i esperanto för studiecirkelledare. Kursen, som kan ta emot 25—30 deltagare, äger rum nästa sommar 10—22 augusti. Detaljer om kursen meddelas i kommande nummer av vår tidning.

**Universala kongreso en Bern 1947, 26 juli—2 augusti.**  
Kongressavgift och logi: Se anmälningsblankett, som erhålles hos SEF.

**Betalning:** Inköp på närmaste bank en postremissväxel på schweiziska francs. Växeln sändes i öppet rek. brev till Bern.

**Kongress-karavan:** Gemensamhetsresa ordnas i samråd med RESO. Direkta vagnar Stockholm—Bern. Biljettpriiset är ännu ej fastställt, meddelas i följande nummer.

# La junularkolono TJO

## Iom pri LA ESPERO 1947

### La junularkolono.

Kio okazas en la junularaj Esperanto-movadoj en la mondo ĝuste nun? Eble oni demandas tion kaj ni klopodas doni kiel eble plej detalan respon- don. Do, ek al la novaĵoj!

### En Rio de Janeiro

oni antaŭ unu jaro fondis Esperanto-klubon en la kadro de la Kristana Asocio de Junuloj (YMCA). La klubo jam havas pli ol 200 membrojn kaj evi- dente ĝi laboras por Esperanto inter kristanaj ge- junuloj. Se vi interesiĝas pri leterkontakto kun la membroj en tiu klubo, vi povas sendi la leterojn al la jena adreso: Kristana Asocio de Junuloj en Rio de Janeiro, Brazilo.

### La junulgasteja movado.

La paco venis kaj kompreneble ankaŭ reviviĝis la diversaj internaciaj junular-organizo. Precipe menciinda estas la internacia junulgasteja movado, kiu akceptas ĉiujn gejunulojn pacemajn. La mem- broj kompreneble havas tre diferencajn interesojn, sed ili laboras por paco kaj interkompreniĝo. Mul- taj junaj esperantistoj, precipe en Francujo kaj Belgujo estas membroj en tiu movado kaj tie pro- pagandas la lingvon. Antaŭ kelka tempo oni dis- sendis alvokon, kiu tekstas jene:

La junulgastejanoj el ĉiuj landoj, kiuj deziras krei internacian esperanto-agadon en la junulgaste- jtoj sin turnu al S-ro A. Albault, 49 rue de Cal. Battesti, Reims, Francujo.

### Alvoko ankaŭ venas el Belgujo.

Gejunuloj en ĉiuj landoj: konigu vian landon! La belga gazeto "Auberges", sendependa organo de la Junulgastejanoj, deziras kontaktiĝi kun ge- junuloj en la tuta mondo. La celo estas, ke tiuj gejunuloj regule verku artikolojn por la gazeto pri ĉiaj temoj, ekz. pri junularaj organizoj en div, landoj k.t.p. Se vi volas skribi artikolojn por la Esperanto-rubriko en "Auberges", sendu tiajn al: Léopold Hoger, 84 Chaussée de Gand, Bruxelles, Belgujo.

### Joganoj.

Se vi volas kontakti la joganon\*) movadon, vi kaptu la okazon viziti la esperantistan semajnon, kiu verŝajne estos aranĝata tuj post la kongreso de Bern kaj en la sama regiono.

\*) junulargastejano.

### Internacia junularkunveno en Anglujo 1947.

La ĝenerala kunveno de TJO okazos en Ipswich, Anglujo. La junaj angloj entuziasme laboras kaj oni promesas, ke la kostoj estas malaltaj. Do — anoncu vin baldaŭ!

### Internacia Amikeca Ligo. (International Friendship League.)

Por fari propagandon inter la membroj de ĉi tiu ligo, skribu al la jena adreso, se vi deziras korespondi: Mlle Odette Libot, 51 Brd de Lorraine, Clichy, Seine (Francujo).

Por la 1947-a jarkolekto ni planas kelkajn nova- ĵojn. La verdkolora vinjeto revenos, kaj la paĝ- nombro estos pli alta. Speciala spaco estos dedi- ĉata al fakintereso, ekz. JUNULAR- kaj SKOLT- movado, FILATELIO, ŜAKO, ktp. Krom tio re- venos pli regule LINGVAJ PROBLEMOJ, ENIG- MOJ KAJ KONKURSOJ, KORESPONDADO, AK- TUALAJ INTERVJUOJ, kaj tiam kaj tiam ni donos tutan paĝon al iu klubo, por ke ĝi faru ra- portajon el sia loko, ne nur pri la esperanta movado, sed prefere pri aliaj aktualaĵoj, kiuj povas interesi ankaŭ eksterlandajn legantojn. Por tia paĝo oni certe facile ankaŭ povos kolekti anoncojn de lokaj firmoj. Noveloj, poemoj, novaĵoj kaj ev. felietono de niaj plej bonaj aŭtoroj kaj tradukantoj esper- eble kontentigos eĉ la plej postuleman leganton.

Jes, ni volas fari ĉion por ke LA ESPERO estu enhavoriĉa kaj pro tio ĉiam sopirata. Sed, de- pendas multe ankaŭ de vi, kara leganto! Se ni povas realigi ĉiujn niajn intencojn rilate ĉi-supre nomitajn aferojn, ni *unue* devas esti certaj pri multe pli grandnombra abonantaro ol tiu, kiun ni ĝis nun havis, *due* la esperantistoj devas provi pli intense kontribui per artikoloj kaj bonaj tradukoj.

Por stimuli la esperantistojn kolekti abonantojn de LA ESPERO la eldonejo decidis disdoni premiojn laŭ jena tabelo:

Por 5 abonopj	— libro je valoro de ..	5:—
„ 10 „	— libroj „ „ „ ..	8:—
„ 15 „	— libroj „ „ „ ..	12:—
„ 20 „	— elekteleblaj libroj por	16:—
„ 25 „	— „ „ „ „	20:—

La premioj konsistas el libroj vendataj de Eldona Societo Esperanto. La koncernaj abonopj estu sen- dataj al la eldonejo plej malfrue la 31-an de ja- nuaro 1947.

La abonoprezo estos por 1947 la sama kiel ĉi-jare, kr. 4:— por svedoj kaj kr. 4:50 por abonantoj en aliaj landoj.

Kiamaniere oni abonas je LA ESPERO? 3 eble- coj estas:

- 1) Rekte ĉe Eldona Societo Esperanto, Stock- holm 19. Poŝtkonto 578.
- 2) Individua membro de Sveda Esperanto Federacio pagas jarkotizon de kr. 7:50 al poŝtkonto 2012

### Allers.

La semajna ĵurnalo "Allers", ĵus startis kores- pondklubon. Ĉiu interesata junulo aŭ junulino sin turnu al: Allers Brevklubb, Hälsingborg, kaj petu adresojn al korespondemuloj. Ne forgesu mencii Esperanton!

### Aktualaj svedaj adresoj:

Svenska Esperanto-Förbundets Ungdomssektion, Tegelbacken, Stockholm C (junularlaboro ĝenerale).

S-ro Arne Caldenfeldt, Förtroligheten 35, Göte- borg S. (Pri junularinterŝanĝoj.)

kaj ricevas per tio membrecon kaj la gazeton aŭtomate.

3) Kolektiva abono pere de klubo, per kio la abonprezo fariĝas nur kr. 3:20 kaj estas enkalkulita en la membrototizo.

Atentu bone ke vi pagu en ĝusta maniero kaj provu plej malfrue en januaro pagi vian abonon; tio helpas nin aranĝi eldonon kaj ekspedon pli akurate. Uzu prefere la kunmetitan poŝtkontoblanke-

don.  
Koran dankon por 1946 — bonvenon kiel abonanto 1947!

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

**Semajnfina vojaĝo**

Korespondanto de "Times" renkontis vojaĝinton kiu faris semajnfina vojaĝon al la kontinento. Li estis kunportinta 75 pundojn (t.e. la maksimuma sumo permesita). En Genevo li ricevis por unu funto oficiale 17 svisajn frankojn. Li aĉetis silkan ĉemizon kaj arĝentan bruligilon, pagis hotelon kaj ĉion kaj deponis la reston (1200 sv.-fk.) ĉe svisa konfidulo. En Francujo li ricevis por la bonhavo de 1200 sv.fr. 120.000 francajn frankojn (nigre), anstataŭ la oficialaj 36.000. Li bonege vivis unu tagon en Parizo, restis al li 112.000 frankoj, kaj ilin li deponis ĉe agento proksime de la Opero. Reveninte Londonon, li vendis la francan deponaĵon por 160 pundoj. Li do ne nur estis farinta belan vojaĝon, dum kiu li bone vivis, sed li krom tio profitis silkan ĉemizon, arĝentan bruligilon kaj — 85 pundojn kontante!

**Specialerbjudande till alla våra läsare!**

Var och en som under december eller januari månad insänder å sista sidan befintlig premiekupong samt 25 öre för porto och expeditiionskostnader pr bok får nedanstående böcker

**GRATIS**

- NORDA LITERATURO
- PER KIO NI AMUZU NIN
- BOVENS BRAVAD
- BARBRO KAJ ERIKO
- LA KONSCIENCO RIPROĈAS
- LINGVA KVARONHORO
- ESPERANTA LEGOLIBRETO
- HUR LEDER MAN FORTSÄTTNINGSKURSER
- SONOJ KAJ VORTOJ DE ESPERANTO
- DIALOGOJ KAJ KOMEDIETOJ
- BENGALAJ FABELOJ
- LA ESPERANTOKLUBO
- KAJ ĈIO RESTAS PENSO SED NE FARO

Likvid skall insändas med beställningen — gärna i frimärken.

**Observera!** Detta erbjudande gäller endast under december och januari. Passa därför på detta unika tillfälle och sänd rekvisitionen redan idag till

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO**  
Fack 19071 - Stockholm 19 - Postgiro 578

**Köp hem utländsk esperanto-litteratur till jul!**

Anni kaj Montmartre, av Reymond Schwartz	hft.	1: 50
Anstataŭa Edzino, av Erica Maxwell	inb.	4: 50
Belga Antologio. Du partoj	hft.	9: 50
La dormanto vekigās, av H. G. Wells	inb.	3: —
D-ro Dorner, av H. L. Egerrup	hft.	6: 50
El la nebulo, av Christian Hougaard	hft.	1: —
Fabeloj de Andersen. Dua parto	hft.	2: 25
" " " Tria parto	hft.	2: 25
Fabiola, av Wieseman	hft.	4: 75
Fanny, av Edna Ferber	inb.	5: —
Filatela Terminaro, av H. M. Scott	hft.	1: —
La Forto de l'vero, av Adi	hft.	2: 50
Fundamenta Krestomatio de Esperanto. Zamenhof	hft.	4: —
Gaja knabo, av Björnstjerne Björnson	hft.	2: —
Gaja leganto, av P. E. Schwerin	hft.	1: 25
Hamleto, av Shakespeare	hft.	1: 50
Historio de Esperanto. Brüggeman	hft.	0: 40
Historio de la lingvo Esperanto. Privat.		
Del I	inb.	3: —
" II	inb.	6: —
La homo kiun milionoĵ aŭskultas. Av Gunnar nar Furhammar	hft.	1: 75
Jolanto. Av Henriko Hertz	hft.	1: —
Kiel eduki niajn infanojn. Av Ad. Ferriere.	hft.	1: 25
Knock aŭ La triumfo de Medicino. Av Jules Romains	hft.	1: 25
Kompatinda Klem, av John Merchant	hft.	1: 50
Lingvaj Respondoj. Plena kolekto. Zamenhof.	hft.	1: 50
Londonanidoj, av Donald W. Munns	hft.	2: 75
La Longa Vojo. Richard Meye	hft.	2: 75
Majstronoveloj. Theodor Storm	inb.	3: 50
La maro. Gerstäcker	inb.	3: 50
Maksimoj. Av La Rochefoucauld	hft.	1: 80
La Mondon al ni. Erich Kilian	hft.	1: 75
La perfido. Av A. M. de Jong	inb.	5: 25
Pinokjo. Av C. Collodi	inb.	5: —
Pli ol Fantazio. Av Agnes Bögh-Högsted	hft.	3: —
Prozo el danaj-norvegaj aŭtoroj	hft.	0: 60
Raportoj kaj konkludoj. Esperanto en moderna Vivo	hft.	1: 10
Riĉa kaj sen mono. Philip Oppenheim	inb.	5: —
La stranga butikoj. Raymond Schwartz	hft.	2: —
La teatra korbo. Av Julio Baghy	hft.	2: —
The Gospel in many tongues	hft.	2: 50
Tra densa mallumo. Kopenhago 1942	hft.	2: 50
Undino. Av Olive Schreiner	inb.	5: —
Vagabondo kaj Sinjorino. Av Walther Klopfer	inb.	7: —
Verdaj Donkifotoj. Julio Baghy	hft.	2: —
La verda koro. Julio Baghy	hft.	2: 25
La Viro el Francujo. Ivans	inb.	5: —
Vivo de Zamenhof	kart.	3: 25
Dito	inb.	5: 50

**Epoko-libroj (häftade):**

1. Murdo en la Orienta Ekspreso. Av Agatha Christie ..... 2: —
  2. La Knaboj de Paŭlo-Strato. F. Molnár .... 2: —
  3. La Princo kaj Betty. P. G. Wodehouse .... 2: —
  4. La Tempo-Maŝino. H. G. Wells ..... 2: —
  5. Princino de Marso. Edgar Rice Burroughs .. 2: —
  6. Colomba. Prosper Mérimée ..... 2: —
  7. Sep vangofrapoj. Karlo Aszlányi ..... 3: 25
  8. La virineto en Bluo ..... 3: —
- 15 % för porto och oms tillkommer.

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO, Stockholm 19**

**TJECKOSLOVAKIET.**

S-ro Rudolf Beleš, fakinstruisto, *Petrzalka*, Svätoplukova ul. 39, volas havi svedan korespondanton.

Esperanto-magasinet

# 4a Rapsodio

har utkommit.

Redigerad av **Dro F. Szilágyi**.

Pris kr. 2:— + oms och porto.

Använd bifogade beställningskort.

I original eller översättning äro bl. a. följande författare representerade:

Stellan Engholm	K. Kalocsay	B. Gerdman
J. H. Roszbach	C. Stöp-Bowitz	V. Setälä
F. Szilágyi	I. Ráth-Végh	L. Tarkony
G. Varinghien	F. Karinthy	J. Liiv
Hj. Dahlén	G. M. Silfverstolpe	

jänte ett flertal andra, som i poesi eller prosa ge oss ett urval av högklassig esperantoläsning.

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO**  
Stockholm 19

## Svenska Esperanto-Tidningen

La Espero

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Organ for Svenska Esperanto-Förbundet

Redaktör: Oskar Svantesson, Skonertgatan 1,  
Käringberget.Prenumerationspris: helt år kr. 4:— . Lösnummer  
0:40. Utkommer en gång i månaden.Annonspris: 20 öre pr mm. Korrespondensannons:  
1:50.Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Box  
190 71, Stockholm 19. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a.**, post-  
adress: Box 19071, Stockholm 19 (Expedition:  
Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen:  
50 88 05.) Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, kor-  
respondenskurser o. s. v.)**SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET**, Tegelbacken,  
Stockholm. Postgiro 5 15 11.

### F E R M I T A :

Nia ekspedejo estos fermita inter la 20-a de decembro kaj la 6-a de januaro. Ni bezonas kristnaskan ripozon (sed devos ankaŭ fari la inventarion).

RIPOZPLENAN KRISTNASKON kaj PROSPERPLENAN NOVAN JARON deziras al ĉiuj siaj aĉetemaj klientoj

**ELDONA SOCIETO ESPERANTO**

### TYSKLAND.

Kun esperantistoj en Svedlando deziras korespondi Werter Gennert, Berlin N 4, Chausseestrasse 131 III.

Deziras korespondi pri diversaj temoj, speciale grafiko, Margret Müller-Oelrichs (studentino ĉe la art-altlernejo), 23 Bremen, Dijonstrasse 12, brita zono de Germanio.

S-ro Heinrich Kuhlwilm, 21 Hamm (Westfalen), Wilhelmstrasse 83 a. Antaŭ la jaro 1933 li korespondis kun s-ro en Svedala, kies adreson li perdis.

### FRANKRIKE.

Popol-instruisto Jules Lebrun, 9 Rue Guynemer, Busigny, Nord France, serĉas svedajn korespondantojn por siaj gelernantoj (1 plenkreskulo, 2 fraŭlinoj kaj 2 junuloj).

### SPANIEN.

Hispana kursgvidanto deziras por siaj lernantoj adresojn de svedoj. Skribu al: s-ro José Tuset, Nueva 18, Manresa (Barcelona), Spanien.

### MALMULTEKOSTAJ, FACILE SENDEBLAJ KRISTDONACOJ!

Pergamenobjektoj (pagmontriloj, grandaj, malgrandaj alumetskatoloj, ktp.), mane pentritaj, perlobjektoj. Prezoj:

Pag-montriloj 1:25, grandaj alumetskatoloj 3:50, malgrandaj alumetskatoloj 0:75.

Sendu vian mendon laŭeble plej baldaŭ! Rose Szilágyi, Tredje Villag. 26, Borås.

**Redigeringen av nummer 1, 1947 avslutas den 30 december.**

# Y T O N G

är det idealiska väggmaterialet för bostadshus och industribyggnader. Tack vare den stora isoleringsförmågan ger den fuktfria och sunda bostäder. Undvik trähusets brandrisk och höga underhållskostnader. Bygg i bättre klass genom att använda Ytong.

**Bygg för framtiden ett högisolerande stenhus till samma eller lägre pris än ett trähus.****YXHULTS STENHUGGERI A.B.**  
Hällabrottet

